Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 30/07/2021 Kvincentkvardekunua eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 810,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas 279,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas 228,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas 201,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas 102,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde decembro 2021)

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 45 de "Por Komencantoj".

GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). En la kompleksa frazo "Tiu, kiun mi ĉiam povis fidi, estis dum dek jaroj mia fidela amiko", kio estas la ĉeffrazo kaj kio estas la suborda frazo?


2). En la kanto "La Espero" troviĝas en la unua strofo la longa simpla (= sen subfrazoj) propozicio (= frazo) "Ne al glavo sangon soifanta ĝi la homan tiras familion". Kio estas la gramatika subjekto kaj kio estas la unuvorta predikato?

3). En la longa frazo en numero 2). troviĝas la adjekto "(ne) al glavo sangon soifanta" kies kernparto estas "(al) glavo". Tiu kernvorto estas, kiel kutime, substantivo. Tiu substantivo ĉehavas adjektivon (kio ofte okazas); kio estas la adjektivo kaj kio estas la verbeca sufikso de tiu adjektivo?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 541. *Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au




## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



Esperanta Retradio

Ĉu oni povas lerni kompaton? **21a Julio 2021**

## 3ZZZ.........



.Krom kelkaj movadaj informoj la elsendo de la 26a de julio 2021 proponas vidpunkton de lokano pri la manifestacioj en Kubo kaj informojn pri Novzelando .

*Franciska Toubale*

## " Kiel oni fariĝas ekskomencanto."

La kurso kiu instruas kiel legi, aŭskulti kaj revizii ĉiun tagan Esperanton - Duolingo

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.

**Artikoloj por AE.** Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, vi povas uzi la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendi ĝin rekte al AE *Roger Springer*


***Google Translate*** estas bonega tradukilo por vortoj anstataŭ uzi vortaron. Metu la ligon sur vian ekranon.

## Magiaj someraj vestoj

Ĉinaj sciencistoj elpensis manieron helpi homojn trakti la altiĝantajn temperaturojn projektante ĉemizan ŝtofon, kiu povas teni la haŭton malvarmeta

Do en la proksima estonto vi havos vintrajn vestojn kontraŭ la malvarmo kaj somerajn vestojn kontraŭ la varmo

*Roger Springer*





*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au




**Mono**. estas la sango de niaj ekonomiaj sistemoj

Infanoj lernas pri la aĉetebleca uzo de mono antaŭ ol ili lernas kiel piediri.

Nia tuta ekonomia sistemo ekzistas ĉar homoj uzas ĝin por la interŝanĝo de aĵoj.

## Problemo unua



La valoro de homa laboro malpliiĝas.

Maŝinoj kaj komputiloj produktas aĵojn plej efike kaj anstataŭas homan laboron. La ekvilibro inter aĉeto kaj produktado de aĵoj fiaskas.

Plejparto de la homoj perdas la eblon gajni monon

## Antaŭaj Solvoj



Turismo, Modo, Liberaj tagoj, Kafejbutikoj, Malŝparo, forĵeto de ne tute perfektaj aĵoj, ktp.

Milito kulpas pli ol ĉiuj aliaj malŝparoj en nia mondo.

Milionoj da soldatoj detruas ion ajn.

## Ekonomia Sistemo



La nuna ekonomia sistemo demandas ke ĉiuj estu laboristo, pensiulo, ŝtelisto, militisto aŭ riĉulo. Kaj ĝi devigas ilin butikumi kaj aĉeti ion ajn por cirkuligi la monon.

Nun multaj homoj hodiaŭ laboras laborojn, kiujn ili ne ŝatas, por aĉeti aferojn, kiujn ili ne bezonas, por ke ili povu impresi homojn, kiujn ili ne ŝatas. Sed fine de la vivo ĉi tiuj homoj profunde bedaŭros pasigi sian vivon provante impresi aliajn homojn. Estu humila kaj serĉu impresi nur vin.

Lasu aliajn homojn zorgi pri ĉasado de statuso. Ĉi tiu perspektivo estas ege liberiga. Sed ĉiuj devas iel havi monon por ke la sistemo funkciu. Do vi devas labori aŭ malsatmorti.

## Laboro

Nun la produktadon de multaj aĵoj faras lertaj maŝinoj ne homoj

La problemo estas ke senlaborhomoj ne havas monon por aĉeti multe da aĵoj.

Do produktado ne egalas konsumeblecon

## Estonta solvo estas universala pensio

Unue donu pension al ĉiuj pli ol dek ses jarulo. Eble en Aŭstralio povus esti $500 ĉiusemajne

Ne sufiĉa mono por subteni vin?

Loĝu kun unu aliulo vi kune havas $1000. Tri homoj kune havas $1500. ktp

Laboru iomete aŭ plentempe por aĉeti pli da aĵoj. Ne plu estus problemo trovi laboron ĉar multaj elektos ne labori komerce kaj ĝui la vivon.

De kie venos la mono? Ĉiuj landoj nun kreas multege da mono el la aero. Tio ne estas sekreto.

Kaj la nuna ekonomio bezonas aĉetantojn por funkcii. Nenia problemo!

Estas lertaj homoj en la mondo kiuj flugas al la luno. Ĉu universala pensio estu granda problemo?

Mi emeritiĝis antaŭ 35 jaroj kaj neniam bedaŭris tion. Roger Springer

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

# Ĉesu Ekskludi Militan Poluadon de Klimataj Interkonsentoj

Stop Excluding Military Pollution from Climate Agreements (actionnetwork.org) subskribu la peticion

Ellasoj de poluada gaso de transmaraj militaj bazoj de lando devas esti plene raportitaj kaj kulpigu tiun landon, ne la lando kie la bazo situas. *Roger Springer*

# Edukada projekto de ACM Benino.



Antaŭ pli-malpli du jaroj, Afrika Centro Mondcivitana/ACM Benino ne povis efike agadi en edukado pro manko de subtenintoj kaŭze de la pandemia krizo. ACM ne kapablis ion fari por la geinfanoj kiel antaŭe. Ĝi tamen progresis kaj plu progresas en la instruado de Esperanto.

Ĉi-jare ACM decidis lanĉi alvokon por kolekti lernejaĵojn kaj por subteni lernokostojn por 25 lernantoj. Ni bonvenigas lernejaĵojn kaj donacojn cele al la kleriga subtenado por la geinfanoj.

La venonta novlerneja jaro komenciĝos septembre 2021.

Bv viziti nian paĝon por konatiĝi kun niaj aktivaĵoj:
www.acmbenin.org , https://www.facebook.com/citoyenmond/ aŭ https ://www.facebook.com/groups/347708065924001/

Ni invitas kaj petas de vi ĉiuj subteni niajn agadojn. Lernejaĵojn oni povas sendi al: Afrika Centro Mondcivitana/ACM Benin, BP 226 Lokossa-Mono,Rep du Benin.

Monkontribuo povus esti sendota per UEA-konto de nia kunlaboranto, Nicola Ruggiero (niru-b) retadreso: nicolaruggiero1986@gmail.com aŭ al nia PayPal administranto, Ralf Haumer per PayPal konto: acmbenin@razokama.de



Ni anticipe dankas vin por via kontribuo por kovri la bezonatan sumon 1075 eŭroj (20eŭroj × 25 kaj 23 eŭroj ×25). Ĉiu lernanto bezonas 43 eŭrojn por lernejiĝi.

Verkis, *Francois Hounsounou*, prezidanto de ACM Benino.

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

# Studebloj tuj je via servo




**Kaptu la okazon kaj aliĝu al la sekva interlingvistika grupo aŭ informu viajn konatulojn pri la universitataj studoj! Ili okazos plejparte rete.** Jam estas aliĝintoj el Ĉinio, Koreio, Brazilo, Francio, Norvegio, Slovakio….

Ĵus aperis varbfilmeto por la nova interlingvistika grupo:

https://www.youtube.com/watch?v=-cvm2ybeKcs

Vi povas trovi informojn en: https://edukado.net/novajhoj?id=849 kun aliaj filmetoj kaj en la retejo de la studoj: http://interl.amu.edu.pl

Intervjuo kun la gvidanto de la Studoj en: http://pola-retradio.org/2021/04/e_elsendo-el-la-07-04-2021/

Prezento de la Interlingvistikaj studoj fone de universitata instruado: https://esfconnected.org/2021/07/09/interlingvistikaj-studoj-uam-poznano-pl/

Sendis al AE Katja Steele

La striktaj landlimaj kontroloj kaj blokadoj de Aŭstralio savis preskaŭ 50.000 vivojn

## Kio estas Mono?

Ĉu mono estas la havebla energio en la mondo.
Ĉu homa aŭ besta Laboro? La Suno? Vento? Gravito? ktp.
Aldonatas ankaŭ la rezervejo de energio de antaŭaj jaroj. Oleo? Gaso? Karbo? Atomo?
La bankmonoj (banknotoj, komputilaj ciferoj) estas ligitaj al energio, Ili devas egali al energio.
Landaj kontekspertizistoj balanciĝas ĝin sed se ne, la Inflacio kaj malinflacio kontrolas tion.

*Roger Springer*

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)*



# La nova Zelando en Nederlando.

**EKAPERIS POST LA MALAPERO,**

droniĝo kun dumil homoj kaj miloj da bovinoj en la teruraj inundoj pro terura marleviĝo en la komenco de la jaro 1953.

**LA ARTIKOLO DE DAVID RYAN**

pri la historio de lia lando kaj de ĝiaj nomoj, en E.S.K. 141, estas tre informa kaj tial valora. Eĉ se mi povus, mi ne bezonus aldoni al tio. Mi ĉi tie donos nur kelkajn ideojn pri la koncernaj nomoj.

Mi samopinias kun li kaj kun la plejmulto de la "New Zealanders" ke nun estas tro malfrue ŝanĝi la nomon, pro financaj kaj komercaj ialoj. Kvankam aspektas stulta havi nederlandecan nomon dum la rilatoj kun Nederlando estis tre malmultaj kaj iometaj nur antaŭ multaj jarcentoj. Ĉar ŝanĝiĝo ne okazos, la serĉado de aliaj nomoj kaj lingvoj estas nur interesa ludo.

Mi ne kredas, ke la rilatoj inter Njuzelando kaj Aŭstralio estas tiom fortaj kiom David pensas. Mi ankaŭ ne kredas ke "Nova Tasmanio" povus esti alternativo, ĉar la nomo Tasmanio estas same nederlanda kaj tial ne konsiderinda. Kaj la nomo "Okcidenta Nov-Zelando ne saĝas ĉar la nomo "Aŭstralio" ne rilatas al aliaj landoj, nur al ĝia situacio en la mondo. La nomŝanĝiĝoj de multaj afrikaj landoj, antaŭaj kolonioj, baziĝas multe sur ŝanĝiĝo de registaroj kaj ofte enhavas iom da teritoriaj ŝanĝiĝoj.

David ne tuŝas la nomŝanĝon en Esperanto. Verŝajne li opinias ke la Esperanta nomo estu la sama kiel la nacia. Se jes, mi opinias ke en tio li malpravas: en la nomo "Sovetunio" ne estas la vorto "Rusujo, nek en "Usono" estas "United States", nek en "Ĉinujo" la ĉinlingva nomo por "China". Se dezirate, la Esperanta nomo por "New-Zealand" povus esti "Maoriujo" aŭ "Senvagonarlando". Cetere pri la Esperantonomo de sia lando decidas la landanoj, se ĝi estas laŭ la reguloj de Esperanto. Tiel "Nova Zelando" ne taŭgas, ĉar tio estas la nova nederlanda provinco. Sed taŭgas "Novzelando", kaj "Ŝaflando", kaj "Njuzelando" (same kiel "Papunjugineo".

**LA GEOGRAFIAJ NOMOJ EN ESPERANTO**. David tute ne indikas la kreadon de Esperantaj geografiaj nomoj ĝenerale, ĉar pri tio lia artikolo ne temas. Sed eble utilas mencii miajn principojn pri tio. Unue ni jam havas la du sistemojn kreitajn de Zamenhof; ni ne povas ŝanĝi ilin, kvankam ni povus, se ni volus, neigi ilin kaj laŭfundamente krei novan sistemon. Mi ne favoras tion, speciale ne pro la evidenta malklereco de la nunaj Akademianoj. Sed mi postulas, ke oni almenaŭ traktu la ankoraŭ ne-Fundamentajn, la multegajn neologismojn, laŭ oni traktas la reston de la Esperanta gramatiko. Tio signifas:

**1)e** ke la radiko de ĉiu geografia nomo estas substantivo kaj ke la vorto por la eventualaj loĝantoj estas la nomo kun la sufikso "-ano".

**2)e** ke la geografia nomo havas la ĉefliteron kaj la vorto por la enloĝanto estas minuskla, same kiel la adjektivo.

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

**3)e** ke normale ne uzatas la artikolo "la" ĉe la geografia nomo.
**4)e** ke la geografia nomo estas ĉiam en la singularo, ĉar ĝi indikas nur unu aferon.
**5)e** ke la geografia nomo konsistas el nur unu vorto, radiko, kiu hazarde povas enhavi nememstaran parton kiu memstare ne apartenas al la nomo.
**6)e** ke do la nomo ne havas afikson nek kunmetaĵon nek komon nek streketon en si.
**7)e** ke ne ekzistas kroma vorto por indiki la saman geografiaĵon.
**8)e** ke nacilingvaj indikoj kiaj "Norda" povas en Esperanto esti nur ajne lingva parto de la radiko, aŭ senmajuskla adjektivo aldonanta karaktereton al la nomo.

Tioj signifas ke ne ekzistas geografiaj nomoj kiaj: **Unue:** "*(la) Eterna" aŭ "*(la) Himalajulo" (por "Jerusalemo" aŭ "(la) himalajano"). **Due**: "*(la) Kvinslandano" por "(la) kvinslandano" kaj "*(la) Aŭstraliaj (ŝafoj)" (por "(la) aŭstraliaj (ŝafoj)". **Trie**: "*La Hago" (por "Hago") kaj "*la Rejno" (por "Rejno"). Sed eblas "La Rejno" por "La rivero Rejno". Same eblas "La Vesuvio" por "La vulkano Vesuvio". **Kvare**: "*en la Filipinoj" (por "en Filipinio" aŭ "en Filipinujo"). **Kvine**: "*(apud) Indus Rivero" aŭ "(apud) Indus-Rivero" (por "(apud) rivero Induso" aŭ "Indusrivero"). **Sese**: "*(per la) Alorientrivero (= Danubo)" kaj "*Afrik-Sudo" (= "Sudafriko"aŭ "Saŭzafriko"). **Sepe**: Ekzemple ne ambaŭ "Etiopio" kaj "Abesinio". **Oke**: Do ne eblas "*Norda Ameriko" por "Nordameriko" nek "*Suda Afriko" por "Sudafriko". *Marcel Leereveld.*

# Flugas la Birdo



Száll a madár… – Flugas la birdo… (oszk.hu)

S-ino Adrienne Pásztor el la hungara urbo Miskolc disponigas al la vasta publiko sian verkon **Száll a madár...** : Elbeszélések, fordítások = Flugas la birdo... : rakontoj, tradukoj / **Pásztorné Földi Adrienne** ; fordító Pásztorné Földi Adrienne; szerkesztő Bakos József

Post la malfermo de la adreso se vi klakos al la dekstra bildo (titolpaĝo de la libro) vi trovos skribaĵojn de Marjorie Boulton, Guy de Maupassant, Stano Marĉek, Hori Jasuo kaj de pluraj aliaj. Sendis *Katja Steele*






Saluton Roger
Kore mi dankas vin por via bona scio de Esperantaj literoj.
La senpaga paĝo http://esperanto.typeit.org ŝajnas al mi la plej uzebla programo.
Mi gratulas vin pro la ebleco daŭrigi vian mirindan E-ĵurnalon ĝis la numero 539. Ĝuas mi legi AE ofte, kaj sentas la fortajn E-retaĵojn de nia esperantujo. La tajpoj pliboniĝis tiel bone
Bonvolu mem-zorgi! Wattle floroj estas nuntempe belaj en la Taylors Parko en nia urbeto.
. Koran dankon! Amike *Marumi Smith* Torquay Viktorio

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au




## Altfrekvenca Aktiva Aŭrora Esplora Programo

Bildrezulto por Altfrekvenca Aktiva Aŭrora Esplora Programo La Altfrekvenca Aktiva Aŭrora Esplora Programo (HAARP) estis komencita kiel jonosfera esplora programo kune financita de la Usona Aera Forto, la Usona Mararmeo, la Universitato de Alasko Fairbanks, kaj la Defence Advanced Research Projects Agency. *Roger Springer*

Usona aerarmeo diris ke ili povas ŝanĝi la veteron. Air Force Bombshell: Admits They Can Control Weather – HAARP » Air Force Bombshell: Admits They Can Control Weather – HAARP | Geoengineering Watch

**Ĉu la mondo nun spertas nekutimajn, damaĝajn veterajn eventojn?**

## ESK FOTO-ENIGMO



Jen pruvo, ke ja ekzistas koboldoj inter ni. Tiuj petolemaj aĉuletoj iel sukcesis forigi la fotojn de kvar paĝoj en nia ESK de Marto '21. Kaj ne nur tio, sed la samaj fuŝiguloj (eble estas tuta kartelo de ili - ho mia kor') certigis, ke tiu 'marta' eldono fakte dissendiĝu je la fino de Julio.

Tamen!!! - nepre necesas tri ekkriaj signoj - miaopinie la senparalele belega vidaĵo de Whanganui, Nov-Zelando, kaptita en foto de David Ryan kaj presita sur la kovrilo, pli ol kompensas la mankon de la neaperintaj fotoj kaj la malfruan elsendon. Gratulojn, David. Koboldoj - ek aliloken! *Vera Payne.*



## Koreaj Esperantistoj kantas "Esperanto estas la lingvo por ni"

https://www.youtube.com/watch?v=Ko0sMsPq7Ic Amike, *Nicole Else*




*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



**SOLVO DE LA KVIZETO 45**

1). Ĉeffrazo: "Tiu estis dum dek jaroj mia fidela amiko".
Suborda frazo: "kiun mi ĉiam povis fidi".
2). Subjekto: "ĝi". Predikato: "tiras".
3). La adjektivo ĉe "glavo" estas "soifanta".
La verbeca sufikso estas "anta".
. *Marcel Leereveld.*

# Universala baza enspezo (UBI)

**Por pli kontentiga kaj sekura mondo**



# Uzu Esperantajn literojn Ĉ, Ĝ, Ĵ, Ĥ, Ŝ kaj Ŭ

## La interreta peticio kun pli ol 16.5 milionoj da subskribantoj

Ĝi estis lanĉita la 17an de julio 2021 kaj ankoraŭ kreskas ĉiujn minutojn (nun 16,500,000)
La interreta peticio postulas ke la OMS (monda sana organizo) inspektu la laboratorion Fort Detrick, Usono por serĉi la originalan kaŭzon de kovida viruso.

**Kial?**

Fort Detrick ne havas bonan historion.
Je la 17 marto 2020, la ĉefa laboratorio de biologia militado de Usono ricevis ordonon ĉesigi ĉiujn esplorojn pri la plej mortigaj virusoj kaj patogenoj pro timoj, ke poluitaj ruboj povu elflui el la instalaĵo. Fort Detrick, en Marilando, estis la epicentro de la esplorado pri bioarmiloj de la usona armeo ekde la komenco de la Malvarma Milito.




**Kiel?**

Dum 18–27 oktobro 2019 en Vuhano, la 7-a Milita Monda Ludoj estis la unua internacia milita multsporta evento okazinta en Ĉinujo, Vuhan, kun preskaŭ 10.000 atletoj el pli ol 100 landoj konkurantaj en 27 sportoj
Suprize, Usono nur gajnis tri arĝentajn medalojn kaj kvin bronzajn medalojn kaj la lando finis en la 35-a loko en la medalotabelo.
Ne forgesu ke la Vuhan laboratorio estis inspektita jam du foje

Informoj el la interreto *Roger Springer*

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*